

Theodor Storm,  
En la arbaro

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉi tie ĉe l' deklivo  
Mutigas nun la vent',  
Kaj sidas sub la branĉoj  
Infano en silent'.

En timian-odoro  
Ŝi sidas sur la ter';  
La bluaj muŝoj zumas  
Kaj brilas tra l' aer'.

Silentas la arbaro,  
Rigardas saĝe ŝi,  
Kaj ĉirkaŭ la harbukloj  
Fluadas sun-radi'.

Kukolo ridas fore;  
Pensigas io min:  
Ŝi havas la okulojn  
De la arbar-reĝin'.

*Traduko de la Germana poemo "Im Walde" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-172-344 (2004-02-22 11:32:56)*